

#### 44 VIRO, KIU NE POVIS DORMI

„Se jam sinjoro Doležal komencis ĉi tie paroli pri la deĉifrado,“ ekparolis sinjoro Kavka, „ankaŭ mi rememoros aferon, kiun iam mi faris al kolego Musil. Kolego Musil estas neordinare klera kaj subtila homo, sed intelektuala tipo: en ĉio li vidas problemon kaj serĉas al ĝi sian vidpunkton. Ekzemple li havas sian vidpunkton ankaŭ al sia propra edzino kaj ne vivas en la geedzeco, sed en problemo de geedzeco; krome li agnoskas socialan problemon, seksan demandon, problemon de subkonscio, edukon problemon, krizon de la nuntempa kulturo kaj tutan aron da aliaj problemoj. Tiaj homoj trovantaj ĉie problemojn estas same netolereblaj, kiel tiuj havantaj principojn. Mi ne ŝatas problemojn; por mi ovo estas ovo, kaj se iu komencus paroli pri problemo de ovo, mi ektimos, ke la ovo estas putra. Ĉi tion nur mencie, por ke vi vidu, kia estas Musil.

Foje antaŭ la Kristnaska festaro li ekdeziris veturi al Krkonoŝe por skii; kaj ĉar li devis ankoraŭ diversion aĉeti, li anoncis, ke li venos adiaŭi la kolegojn iom pli poste. Subite venas serĉi lin doktoro Mandel, vi scias, tiu konata publicisto, ankaŭ la sama stranga maniulo, ke nepre li devas paroli kun sinjoro Musil. Musil ne estas ĉi tie, mi diras, sed versimile li venos ĉi tien por momento antaŭ la forveturo; atendu lin. Doktoro Mandel morniĝis. Atendi mi ne povas, li diris, sed mi skribos sur karteto, kion mi volis pritrakti kun li. - Kaj li eksidis al la tablo kaj skribis. Mi ne scias, ĉu iu el vi vidis pli nelegeblan skribon, ol tiun de doktoro Mandel. Ĝi aspektas kiel registro de sismografo - longa kaj interrompata horizontala linio, kiu iam-tiam vibras aŭ akute saltas. Mi konis tre bone la skribon, kaj nur mi rigardis, kiel lia mano galopas sur la papero. Subite doktoro Mandel nubmienis, ĉifis malpacience la paperfolion, ĵetis ĝin korben kaj eksaltis. Ĝi estus tro longa, li murmuris, kaj jam estis for.

#### 44 MUŽ, KTERÝ NEMOHL SPÁT

„Když už tady pan Doležal začal o tom dešifrování,“ děl na to pan Kavka, „tak jsem si vzpomněl na věc, kterou jsem jednou provedl kolegovi Musilovi. On ten Musil je neobyčejně vzdělaný a subtilní člověk, ale takový typ intelektuála: ve všem vidí problém a hledá k němu své stanovisko. Například on má stanovisko i k své vlastní ženě a nežije v manželství, nýbrž v problému manželství; krom toho uznává sociální problém, pohlavní otázku, problém podvědomí, problém výchovy, krizi dnešní kultury a celou řadu jiných problémů. Tihle lidé, co všude nalézají problémy, jsou stejně nesnesitelní jako ti, co mají zásady. Já nemám rád problémy; pro mne vejce je vejce, a kdyby mně někdo začal mluvit o problému vejce, tak se leknu, že to vejce je zkažené. To jen abyste věděli, jaký ten Musil je.

Jednou před vánoce si zamluvil, že pojedou na Krkonoše lyžovat; a protože si ještě musel koupit to a ono, ohlásil, že se stává rozloučit se s kolegy později. Najednou ho přijde hledat doktor Mandel, víte, ten známý publicista, taky takový zvláštní pavouk, a že musí nutně mluvit s panem Musilem. Musil tu není, povídám, ale snad si sem ještě zaskočí před odjezdem; počkejte na něj. Doktor Mandel se zasmušil. Čekat nemohu, řekl, ale napíšu mu na lístek, co jsem s ním chtěl vyřídit. Nato sedl ke stolu a psal. Já nevím, viděl-li někdo z vás nečitelnější písmo, než má ten doktor Mandel. Ono to vypadá jako záznam seizmografu - taková dlouhá a trhaná vodorovná čára, která se místy zachvěje nebo tak špičatě poskočí. Já to písmo dobře znal, a tož jsem jen koukal, jak mu jede ruka po papíře. Vtom se doktor Mandel zamračil, zmačkal netrpělivě ten list papíru, hodil jej do koše a vyskočil. Ono by to bylo příliš dlouhé, zabručel, a už byl tentam.

Vi scias, tagon antaŭ la Kristnasko oni ne emas serioze labori; mi eksidis do al la tablo kaj komencis fari sur papero sismografajn liniojn: longajn tremtirojn, ie-tie deviantaj supren kaj malsupren, laŭ momenta ideo. Tempeton mi amuziĝis per tio, kaj poste mi metis la zigzagaĵon sur la tablon de Musil.

Tiumomente enfalis la pordon Musil, sportvestita, kun skioj kaj skibastonoj surŝultre. Jam mi veturas, li jubilis en la pordo. Estis ĉi tie iu sinjoro kaj serĉis vin, mi diris rezerveme. Li lasis ĉi tie leteron por vi, laŭdire ĝi estas grava. Montru, diris Musil humore. Aj, iom li surpriziĝis super mia produkto. Ĝi estas de doktoro Mandel; kion nur li volas de mi? Mi ne scias, mi murmuris moroze, tro li hastis; sed sciu, lian skribon mi ne volus deĉifri.

Mi scias legi liajn zigzagaĵojn, deklaris Musil facilanime, demetis la skiojn kaj bastonojn kaj sidiĝis al la tablo. Hm, li diris post kelke da tempo, kaj ege serioziĝis. Duonhoron estis tomba silento.

La unuajn du vortojn mi havus, fine respiris Musil leviĝante, ili estas 'Kara sinjoro'. Sed nun mi devas rapidegi al stacidomo. La leteron mi kunprenos, kaj diablo devus enesti, se mi ne deĉifrus ĝin dum la trajnveturo!

Post la Nova jaro li revenis el sia montara ekspedicio. Nu, kiel vi fartis, mi diras al li. Homo, Musil, kiel bele estas nun en la montaro, ĉu? Musil nur mangestis. Mi tute ne scias, li diris. Mi devas konfesi al vi, ke mi estis dum la tuta tempo en hotelĉambro, eĉ ne la nazon mi montris ekstere; sed onidire estis tie belege. Nu, kio, mi diris kunsente, ĉu vi malsanis?

Ne, diris Musil kun ŝajnegata modesto, sed dum la tuta tempo mi solvis la leteron de Mandel; kaj vi devas scii, mi deĉifris ĝin, li deklaris triumfe. Nur du-tri vortojn mi ne scias ĝis nun tralegi. Tutajn noktojn mi pasigis super ĝi, sed mi enkapigis al mi, ke mi deĉifros ĝin, kaj mi faris tion. Mi ne kuraĝis diri al li, ke la letero estas miaj zigzagaĵoj.

To vité, den před vánoce mi se člověku nechce do vážné práce; tak jsem si sedl ke stolu a začal jsem dělat po papíře seizmografické čáry: takové dlouhé třesavé tahy, tu a tam poskakující nahoru a dolů, jak mě napadlo. Chvilí jsem se tím bavil, a pak jsem ten počmáraný papír položil na Musilův stůl.

V tu chvíli se vhrnul do dveří Musil, vystrojen na hory, s lyžemi a holemi na rameni. Tak už jedu, hlaholil ve dveřích radostně. Byl tu nějaký pán a hledal vás, řekl jsem odměřeně. Nechal vám tady dopis, prý je to důležité. Ukažte, povídá Musil chutě. A hele, zarazil se trochu nad tím mým výrobkem. To je od doktora Mandela; copak mně chce? To nevím, bručel jsem nevlídně, měl moc naspěch; ale vité, to jeho písmo bych nechtěl luštit.

Já jeho klikyháky dovedu číst, prohlásil Musil lehkomyšlně, postavil lyže a hole a sedl si ke stolu. Hm, udělal za chvíli a nesmírně zvažněl. Byla půlhodina hrobového ticha.

Tak první dvě slova bych měl, oddechl si konečně Musil vstávaje, je to ‚Milý pane‘. Ale teď už musím letět na dráhu. Já ten dopis vezmu s sebou, a to by v tom musel být čert, abych to cestou ve vlaku nerozluštil!

Po Novém roce se vrátil ze své horské výpravy. Tak jak jste se měl?, povídám mu. Člověče, Musile, to je teď na horách krása, že? Musil jen mávl rukou. Ani nevím, řekl. Abych se vám přiznal, já jsem byl po celou tu dobu v hotelovém pokoji, ani nos jsem nevystrčil ven; ale lidi říkali, že tam bylo nádherně. Copak, řekl jsem účastně, vy jste stonal?

To ne, povídal Musil s dělanou skromností, ale já jsem po celou tu dobu luštil ten Mandelův dopis; a abyste věděl, taky jsem jej rozluštil, prohlásil triumfálně. Jenom dvě nebo tři slova dosud nemohu přečíst. Celé noci jsem nad tím proseděl, ale já jsem si vzal do hlavy, že to rozluštitím, a udělal jsem to. Já vám neměl tu kuráž říci mu, že ten dopis byly jen mé číryčáry.

Ĉu la letero estis tiel grava? mi demandis kun intereso. Ĉu almenaŭ ĝi valoris la penon? Tio ne gravas, respondis Musil fiere. Min ĝi interesis ĉefe kiel grafologia problemo. Doktoro Mandel petas min tie, ke mi verku por lia revuo artikolon antaŭ forpaso de du semajnoj - pri kio, ĝuste tion mi ne povas tralegi; kaj krome li deziras al mi gajajn kristnaskfestojn kaj agrablan restadon en la montaro. Sume nenio grava; sed la solvado, sinjoro, tio estis perfekta metod-problemo - per nenio alia oni tiel ekzercas la spiriton. Tio jam valoras kelkajn tagojn kaj noktojn."

„Tion vi devintus ne fari al li," riproĉe opiniis sinjoro Paulus; diablo prenu kelkajn tagojn, sed domaĝe pri la sendormaj noktoj. La dormo, sinjoro, ĝi ne estas nur ripozo de la korpo; la dormo estas io kvazaŭ kvitigo kaj absolvo de la pasinta tago. La dormo estas aparta graco; kaj dum la unuaj kelkaj minutoj post bona dormo ĉiu animo estas pura kaj senkulpa kiel infananimo. Mi konas tion, ĉar foje mi perdis la dormon. Eble tio estis sekvoj de l' senbrida vivo aŭ io en mi ne estis en ordo, mi ne scias; sed apenaŭ mi enlitiĝis kaj eksentis la unuan dorman jukon, kvazaŭ io liberigis risorton en mi, kaj mi kuŝis poste horojn kaj horojn kaj okulegis en la mallumon ĝis la mateniĝo. Kaj tio daŭris ĉe mi la tutan jaron, jaron sen dormo.

Kiam oni ne povas ekdormi, unue oni klopodas pensi pri nenio; tial oni kalkulas aŭ preĝas. Subite ŝvebas antaŭ li Kristsinjoro, hieraŭ mi forgesis fari tion kaj ion! Kaj poste li ekhavas ideon, ke eble ili trompis lin en la butiko, kiam li pagis. Poste li rememoras, ke la edzino aŭ amiko antaŭ nelonge iel strange respondis al li. Poste ekkrakas ia meblo kaj li pensas pri ŝtelisto kaj komencas esti al li varme pro timo kaj honto. Kaj kiam li jam timas, li komencas observi sian korpan staton kaj ŝvitante pro la teruro li resumas siajn sciojn pri nefrito aŭ kancero. Neatendite elmergiĝas antaŭ li, kian hontigan stultegaĵon li faris antaŭ dudek jaroj, ke eĉ nun li honte ŝvitas.

A bylo to psaní tak důležité?, ptal jsem se s účastí. Stálo to aspoň za tu práci? Na tom nezáleží, odpověděl Musil hrdě. Mne to zajímalo víc jako grafologický problém. Doktor Mandel mne tam žádá, abych mu do čtrnácti dnů napsal do jeho revue článek, o čem, to právě nemohu přečíst; a pak mi přeje veselé svátky a pěkný pobyt na horách. Dohromady to nic není; ale to řešení, pane, to byl dokonalý metodický oříšek - ničím si tak člověk nepocvičí ducha. To už stojí za těch pár dní a nocí.“

„To jste mu neměl dělat,” mínil káravě pan Paulus; „vem čert pár dní, ale těch nocí beze spánku je škoda. Spánek, pane, to není jen odpočinek těla; spánek je něco jako očista a odpuštění minulého dne. Spánek je zvláštní milost; a prvních pár minut po dobrém spánku je každá duše čistá a nevinná jako dítě. Já to znám, protože jednoho času jsem ztratil spánek. Snad to byly následky nezřízeného života nebo nebylo ve mně něco v pořádku, já nevím; ale sotva jsem lehnul do postele a pocítil v očích první zasvrbení ospalosti, něco ve mně jakoby cuklo, a já pak ležel hodiny a hodiny a vejřil do tmy, až začalo svítat. A to mně trvalo po celý rok, rok beze spánku.

Když tak člověk nemůže usnout, hledí nejdřív nemyslet na nic; proto počítá nebo se modlí. Najednou mu vytane, kristepane, já včera zapomněl udělat to a to! A pak ho napadne, že ho snad napálili v tom krámě, když platil. Potom si vzpomene, že mu jeho žena nebo jeho přítel ondyno tak divně odpověděli. Pak zapraská nějaký kus nábytku, a člověk si myslí, že to je zloděj, a začne mu být horko strachem i hanbou. A když už je v tom strachu, začne pozorovat svůj tělesný stav a zpocen hrůzou uvažuje o tom, co ví o nefritidě nebo o rakovině. Z ničeho nic se mu vynoří, jakou trapnou volovinu provedl před dvaceti lety, že i teď se zapotí studem.

Paŝon post paŝo li konfrontas sin kun ia stranga neforpelebla kaj ne redemptita mi; kun sia malforto, kun siaj propraj brutalaj kaj abomenaj, malsanoj kaj maljustaj, idiotaj, fiaskoj kaj suferoj delonge jam travivitaj. Revenas al li ĉio ĝena kaj doloriga kaj humiliga, ĉio foje spertita; antaŭ nenio estas indulgata tiu, kiu ne povas dormi. La tuta mondo tordiĝas kaj iĝas turmenta perspektivo; aferoj, kiujn vi jam forgesis, rikanas je vi kvazaŭ dirante: Ci bovo, bele ci kondukis tiam; kaj ĉu ci rememoras, kiam cia unua amo, tiam ci estis dekkvarjara, ne venis al rendezuo? Sciu, tiam ŝi interkisis sin kun iu alia, kun cia amiko Vojta, kaj li cin mokis! Ci idioto, idioto, idioto! Kaj li tordiĝas en la brula lito kaj volas kredi al ŝi, damne, tio ne plu rilatas min! Kio estis, pasis kaj fino!

Sciu, tio ne estas vero. Ĉio, kio estis, ekzistas. Daŭras eĉ tio, pri kio ci ne scias. Kaj mi opinias, ke la memoro daŭras ankaŭ post la morto. Sinjoroj amikoj, vi konas min iom; vi scias, ke mi estas nek galhumora, nek hipokondriulo nek ia morozulo, malkontentulo, kverelulo, „ne-tuŝu-min-ulo“, melankoliulo, plendulo, tedulo, aŭ pesimisto. Mi ŝatas la vivon kaj homojn kaj ankaŭ min mem, mi ĵetiĝas senbride en ĉion, mi ŝatas lukti kontraŭ io; unuvorte mi estas ia raspa haŭto, kiel decas kaj konvenas al viro. Ankaŭ tiam, kiam mi perdis la dormon, dum la tago mi klopodegis kaj vigle moviĝis kaj plandegis de tasko al tasko; vi scias, ke mi ĝuas la famon de ege aktiva homo.

Sed apenaŭ vespere mi enlitiĝis kaj komencis mian sendorman nokton, tiam mia vivo duiĝis. Tie estis vivo de aktiva, sukcesa, aplomba kaj sana ulo, kiu prosperas en ĉio dank' al siaj energio, inĝenio kaj provoka feliĉo. Ĉi tie en la lito kuŝis homo mortpelita, kiu kun teruro konsciigadis al si malsukcesojn, honton, malnoblecon, kaj humiligon de sia tuta vivo. Mi estis travivanta du vivojn, kiuj preskaŭ ne kontaktiĝis kaj ege malsimilis:

Krok za krokem se konfrontuje s takovým divným, neodbytným a nevykoupeným já; se svou slabostí, se svými vlastními hrubostmi a ohavnostmi, neduhy a ústrky, blbostmi, blamážemi a utrpením dávno přežitým. Vrací se mu všechno trapné a bolestné a ponižující, co kdy zažil; nic není ušetřeno tomu, kdo nemůže spát. Celý tvůj svět se pokřivuje a nabývá trýznivé perspektivy; věci, které jsi už zapomněl, se na tebe šklebí, jako by ti říkaly: Ty vole, ty ses tehdy pěkně zachoval; a pamatuješ, jak tvá první láska, když ti bylo čtrnáct let, nepřišla na rande? Abys věděl, tehdy se líbala s někým jiným, s tvým přítelem Vojtou, a tobě se posmívali! Ty troubo, troubo, troubo! A člověk se svíjí v té palčivé posteli a chce si namluvit, krucinál, vždyť už mně po tom nic není! Co bylo, bylo, a basta!

Abyste věděli, není to pravda. Všechno, co bylo, je. Trvá i to, o čemž nevíš. A já soudím, že paměť trvá i po smrti. Páni kamarádi, vy mne tak trochu znáte; vy víte, že nejsem kakabus ani hypochondr ani nějaký morous, škarohlíd, kverulant, netýkavka, bolestín, skuhral, protiva nebo pesimista. Mám rád život i lidi i sebe sama, hrnu se do všeho jako blázen, rád se s něčím peru; zkrátka jsem tak sprostá kůže, jak se na chlapa sluší a patří. I tehdy, když jsem ztratil spánek, jsem se ve dne oháněl a čile jsem sebou mrskal a drandil si to od úkolu k úkolu; to víte, že se těším pověsti pozhnaně činného člověka.

Ale sotva jsem večer vlezl do postele a zahájil svou bezesnou noc, můj život se rozdvojil. Tam byl život činného, úspěšného, samolibého a zdravého chlapíka, kterému se všechno daří díky jeho energii, důmyslu a nestydatému štěstí. Tady v posteli ležel člověk uštvaný, který si s hrůzou uvědomoval neúspěchy, hanbu, špinavost a ponížení celého svého života. Já jsem prožíval dva životy, které se sebe skoro nedotýkaly a byly si strašně nepodobny:

la unua tago, konsistanta el sukcesoj, aktiveco, homrilatoj kaj konfido, amuzaj obstakloj kaj diversaj normalaj rutinoj; vivo, en kiu mi estis siaspece feliĉa kaj kontenta pri mi mem.

Sed dum la nokto prezentiĝis la dua vivo, teksita el doloro kaj embarasoj; vivo de homo, kiu en ĉio fiaskis; de homo, kiu estis perfidita de ĉiu kaj mem kondutis al ĉiu malbone, etanime kaj malsaĝe; de homo pri ĉio trompita, tragika konfuzulo, kiun ĉiu malamas kaj trompas, malfortulo, kiu estas venkita kaj mem ŝanceliras de skandalo al skandalo.

Ĉiu el la vivoj estis en si mem konsekvenca, kontinua kaj tuta; kiam mi estis en unu el ili, ŝajnis al mi, ke la dua apartenas al iu alia, ke ĝi ne koncernas min, aŭ ke ĝi estas nur nereala; ke ĝi estas memtrompo kaj malsana iluzio. Dum la tago mi amis; nokte mi suspektis kaj malamis. Dumtage mi travivis la mondon de homoj; nokte mi estis travivanta min mem.

Kiu pensas pri si mem, perdas la mondon. Kaj tiel ŝajnas al mi, ke la dormo estas kiel obskura kaj profunda akvo. En ĝi fordrivas ĉio, pri kio ni ne scias kaj kio ne estas scienda. La stranga ŝlimo, sedimentanta en ni, elmergiĝas kaj forfluas en tiu senkonscio, kiu estas senborda. Niaj malnoblaĵoj kaj malkuraĝoj, ĉiuj niaj ordinaraj kaj hontigaj pekoj, niaj humiligaj idiotaĵoj kaj malsukcesoj, tiu sekundo de mensogo kaj neamo en la okuloj de tiuj, kiujn ni amas, ĉio, pri kio ni kulpiĝis kaj tio, pri kio kulpiĝis la aliaj kontraŭ ni, ĉio ĉi silentete flosas for ien ekster konsciosferon.

La dormo estas treege mizerikorda; ĝi pardonas al ni kaj al niaj kulpuloj. Kaj mi diras ion al vi: Tio, kion ni nomas nia vivo, ne estas ĉio, kion ni travivis; ĝi estas nur elekto. Tio, kion ni travivas, estas troa; pli ol por kio sufiĉas nia racio. Tial ni elektas nur ion kaj tion, kio konvenas al ni kaj el tio ni kunplektas ian simpligitan historion; kaj tiun produkton ni nomas nia vivo. Sed kiom da ruboj dume ni postlasas, kiom da strangaj kaj teruraj aferoj ni preterpasas, Kristsinjoro! se oni nur konsciigus tion al si!

jeden denní, složený z úspěchů, činnosti, lidských styků a důvěry, zábavných překážek a takových těch normálních hejblů; život, ve kterém jsem byl svým způsobem šťasten a spokojen sám se sebou.

Ale v noci se rozvíjel ten druhý život, utkaný z bolesti a rozpaků; život člověka, kterému se nic nezdařilo; člověka, který byl všemi zrazen a sám se ke všem špatně, malodušně a hloupě choval; člověka o všechno ošizeného, tragického vrtáka, kterého každý nenávidí a klame, slabocha, který to prohrál a který se potácí od ostudy k ostudě.

Každý ten život byl sám v sobě důsledný, souvislý a celý; když jsem byl v jednom z nich, zdálo se mi, že ten druhý patří někomu jinému, že se mne netýká nebo že je jenom zdánlivý; že to je sebeklam a chorobná iluze. Ve dne jsem miloval; v noci jsem podezíral a nenáviděl. Ve dne jsem prožíval svět nás lidí; v noci jsem prožíval sama sebe.

Kdo myslí na sebe, ztrácí svět. A tak se mi zdá, že spánek je jako temná a hluboká voda. V ní odplývá všechno, o čem nevíme a nemáme vědět. Ten divný rmut, který se v nás usazuje, se vyplaví a odtéká v tom bezvědomí, které nemá břehů. Naše špatnosti a zbabělosti, všechny ty naše všední a trapné hříchy, naše ponižující voloviny a nezdary, ta vteřina lži a nelásky v očích těch, které milujeme, to, čím jsme se provinili my, i to, čím se jiní provinili na nás, to všechno tichounce odplývá někam za dosah vědomí.

Spánek je nesmírně milosrdný; odpouští nám i našim viníkům. A já vám něco povím: To, čemu říkáme náš život, to není všechno, co jsme prožili; to je jen výběr. Toho, co prožíváme, je příliš mnoho, víc, než nač stačí náš rozum. Proto si jen vybíráme to a ono, co se nám hodí, a jaksi z toho upleteme takový zjednodušený děj; a tomu výrobku říkáme náš život. Ale co odpadků přitom necháváme, co divných a strašných věcí pomíjíme, kristepane, kdyby to si člověk uvědomil!

Sed ni povas vivi nur unu simplan vivon. Estus super niaj fortoj travivi pli multe. Ni ne havus forton elteni la vivon, se ni ne estus perdantaj dumvoje plejparton de vivo."

Ale my můžeme žít jen jeden jednoduchý život. Bylo by nad naši sílu prožít víc. Neměli bychom sílu nést život, kdybychom nepoztráceli cestou většinu života."